

La 77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj
14-a - 21-a de julio 2011
Olomouc
Ĉeĥa respubliko

KONGRESLIBRO

Eldonis:

Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Presis: **Kava-Pech Dobřichovice**

La kongreson organizas:

Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kunlabore kun LIBE

La kongreso efektiviĝas sub aŭspicio kaj kun financa apogo de:

Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj de Ĉeĥa respubliko
vicestrino de la Regiona ofico de Regiono Olomouc s-rino Mgr. Yvona Kubjatová
ĉefurbestro de statuta urbo Olomouc s-ro Martin Novotný
Tyflocentrum Olomouc (organizaĵo, kiu helpas al viddifektitoj en la regiono kaj peras por ili
diversspecajn servojn)
VEOLIA TRANSPORT MORAVA a.s.
Hotelo Sigma Olomouc

Realiga teamo

Prepara komitato:

Jan Příborský - prezidanto
Marie Kebrdlová
Ivana Karašová
Tadeusz Karaš
Milena Jelínková
Jiří Jelínek

Helpantoj:

Jiří Tomeček
Miroslava Tomečková
Jarmila Čejková
Pavla Vejmelková
Jan Duda

La tekstojn de la Kongreslibro preparis:

Jan Příborský
Milena Jelínková
Jiří Jelínek

Tradukoj kaj komputila prilaboro:

Milena Jelínková
Jiří Jelínek

Kongresa temo:

"Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj"

Dua temo (proponita de prezidanto de LIBE):

"Kiamaniere trovi taŭgajn rimedojn por allogi gejunulojn al studado de Esperanto por plifortigi nian movadon"

Saluto de la prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Estimataj gekongresanoj,

mi ĝojas, ke vi denove kongresas en Ĉeĥa respubliko kaj mi kore bonvenigas vin. Mi deziras al vi belan restadon kaj sukcesan agadon.

Mi esperas, ke nia komuna lingvo ebligas al ni renkontiĝi, interkonatiĝi, gajni novajn amikojn kaj ĝoji je vivo. Mi estas fiero pri niaj aktivaj blindaj anoj de ĈEA, kiuj preparis por vi la kongreson en Olomouc kaj mi esperas, ke vi travivos multajn agrablajn momentojn.

Jana Melichárková
prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Saluto de la prezidanto de Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj en Ĉeĥa respubliko

Estimataj gesinjoroj,

mi salutas vian kongreson ne nur kiel prezidanto de la Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj en Ĉeĥa respubliko, sed ankaŭ kiel privata persono. Ni en la organizaĵo bone konscias, kiel longan kaj riĉan tradicion havas Esperanto-movado inter blinduloj ĝenerale kaj en Ĉeĥa respubliko speciale kaj kiel ĝi kontribuas al reciproka interŝanĝo de spertoj kaj ĉiuspecaj informoj inter viddifektitoj. Ni aprezas, ke Esperanto ne nur ebligas, sed unuavice daŭre realigas kontaktojn inter nevidantoj en la tuta mondo.

Esperantistoj interesiĝas pri ĉiuspecaj flankoj de la vivo de samsortanoj kaj pri kulturaj tradicioj kaj nuntempa realo en aliaj landoj. Tial nia organizaĵo daŭre apogas la esperantistojn kaj subtenas ilin ne nur per eldonado de la revuo Aŭroro, sed ankaŭ laŭ ebloj per helpo aŭ organizado de iliaj renkontiĝoj. Unu el ĉi tiuj eventoj estas via 77-a Internacia Kongreso.

Mi deziras al vi, agrablan semajnon en nia lando, sukcesan kongresadon kaj belajn travivaĵojn dum ekskursoj kaj kunvenoj kun geamikoj.

Josef Stiborský
prezidanto de Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj en Ĉeĥa respubliko

Telefonaj kontaktoj al kelkaj membroj de la Prepara komitato

Se dum la kongreso iu el partoprenantoj bezonos konsilon aŭ helpon, vi povas kontakti iun el kvar anoj de la prepara komitato. Jen estas iliaj telefonnumeroj:

Jan Příborský +420 605 265 564
Tadeo Karaš +420 604 686 891
Jiří Jelínek +420 733 772 295
Milena Jelínková +420 603 445 200

Gravaj informoj por partoprenantoj

Helpantoj

Dum la kongreso estas je nia dispono tri vidantaj helpantoj-esperantistoj. Vidantoj povas ilin rekoni laŭ vesto - blanka trikotaĵo kun verda stelo.

Monŝanĝo

En la hotelo SIGMA ne eblas ŝanĝi monon.
La plej proksima monŝanĝejo troviĝas en la stacidomo. Ĝi estas malfermita tagnokte krom kelkaj paŭzoj.

Pri la hotelo SIGMA

Telefonnumero de la akceptejo en la hotelo SIGMA: +420 585 232 076
Personaro en hotela akceptejo parolas anglan lingvon.
Telefonnumero de la akceptejo el ĉambroj: 22

Ĉe unua alveno en la hotelon vi ricevos:

1. nomkarton, kiun bonvolu ĉiam videble porti
2. hotelan karton, kiun vi montros al kelnero ĉe ĉiu matenmanĝo kaj ĉiam, kiam vi revenos en la hotelon
3. ŝlosilon de via ĉambro, kiun vi forirante bonvolu lasi en la akceptejo
4. kartetojn, kiujn vi donados al kelnero ĉe ĉiu tagmanĝo kaj vespermanĝo
5. la hotelan regularon en Esperanto kaj en la angla (nur kelkaj gravaj reguloj)

Numeroj de unuopaj ĉambroj

Sur klinkoj de unuopaj ĉambroj, kie loĝas la gekongresanoj, estas brajlaj numeroj.

El la akceptejo oni povas iri:

1. al lifto por 6 personoj
2. al lifto por 8 personoj en mallonga koridoro
- En ambaŭ liftoj estas butonoj signitaj per brajlaj numeroj.
3. al ŝtuparo
4. al hotela restoracio, kie ni manĝos
5. al kafejo kaj drinkejo
6. al ĉina restoracio troviĝanta en la unua etaĝo, atingebla per aparta ŝtuparo

Salonoj por kunvenoj

Je dispono de kunvenoj de la kongreso estas du salonoj:
La malpligranda havas la nomon de Rudolf Krchňák,
la pligranda havas la nomon de Karel Emanuel Macan.
Ambaŭ salonoj estas atingeblaj per koridoro gvidanta el restoracio aŭ se oni uzos alian
eksteran enirejon de la hotelo, kiu troviĝas kelkdek metrojn flanke de la ĉefa enirejo.

Restoracio

Sur ĉiu tablo en la restoracio estas karto kun numero. Bonvolu okupi lokon ĉe la sama tablo
dum la tuta semajno.
Trinkaĵojn post tag- kaj vespermanĝo pagas la partoprenantoj mem. Vi pagos ilin per ĉeĥaj
kronoj.

Bufedo

En la akceptejo oni povas aĉeti alkoholajn kaj senalkoholajn trinkaĵojn kaj diversajn
bongustaĵojn. Oni povas pagi per la ĉeĥa mono, aŭ per pagkarto.

Interreto

Al Interreto vi povas konekti per WiFi, sed nur en teretaĝo de la hotelo.

Nokta fermo de la hotelo

Ekde la 23-a horo vespere ĝis la 5-a matene estas la hotelo ŝlosita. Gastoj, kiuj revenos en
ĉi tiu tempo, devas sonori ĉe la enirejo, kie estos nokta dungitaro.

Ĉirkaŭaĵo de la hotelo

Proksime de la hotelo troviĝas du vojkruciĝoj ekipitaj per blindusignaliloj
tram- kaj bus-haltejoj
gastejo
vendejo kun nutraĵoj
sukeraĵejo
alia ĉina restoracio
poŝtoŭicejo
Kantanta fontano
taksi-haltejo, tamen mendi taksion oni povas rekte en la akceptejo

Programo de la kongreso

Ĵaŭdo la 14-an de julio

alveno de partoprenantoj - dum la tuta tago

19.00 vespermanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

20.00 Interkona vespero - restoracio en hotelo SIGMA

Vendredo la 15-an de julio

7.00-9.00 matenmanĝo - ĉiam en la restoracio de hotelo SIGMA forme de sveda tablo

8.30 lingva kurso de Esperanto - salono Krchňák

10.00 Solena malfermo de la kongreso - salono Macan

11.30 prelego pri la centjara datreveno de fondiĝo de Esperanto-klubo en Olomouc - salono Macan

- - -

12.30 tagmanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

- - -

15.00 trarigardo de la urbodomo, de ĝia modelo kaj supreniro en la urbodoma turo

16.00 promeno tra historia centro de Olomouc, trarigardo de la kolono de La Sankta Triunuo, de fontanoj kaj de la modelo de historia parto de la urbo

18.30 vespermanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

Sabato la 16-an de julio

7.00-9.00 matenmanĝo

8.30 lingva kurso de Esperanto - salono Krchňák

10.00 prelego laŭ la kongresa temo, "rondtabla" diskutado - salono Macan

- - -

12.30 tagmanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

- - -

14.30 trarigardo de la katedralo de sankta Venceslao kaj de palpa ekspozicio de ekleziaj objektoj, supreniro al la sonorilejo en la katedrala turo, vizito de la apuda ĉefdiocesa muzeo

17.00 koncerto de kantistino kaj orgeno

18.30 vespermanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

20.00 vizito de kafejo en la 18-a etaĝo en la Regiona centro kaj aŭskultado de la proksima "Kantanta fontano"

Dimanĉo la 17-an de julio

7.00-9.00 matenmanĝo

9.30 Sankta meso en Esperanto - preĝejo de sankta Miĥaelo - trarigardo de la templo

- - -

12.30 tagmanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

- - -

14.30 vizito de la monaĥeja fortikaĵo kun eblo supreniri en la turo kaj eĉ kun iu surprizo

16.30 promeno tra la strato de Zamenhof, vizito de la Esperanto-monumento kaj Esperanto-arbo en la plej granda urba parko

18.30 vespermanĝo - restoracio Moritz, vizito de la apuda bierfarejo

Lundo la 18-an de julio

7.00-9.00 matenmanĝo

8.30 lingva kurso de Esperanto - salono Krchňák

10.00 ĝenerala asembleo de LIBE (unua parto) - salono Macan

- - -

12.30 tagmanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

- - -

14.30 vizito en la vendejo de blindulhelpiloj kun eblo aĉeti ilin

17.00 vizito de la historia armea fortikaĵo

- vespermanĝo ĉe (aŭ en) ĉasista kabano en arbaro

Mardo la 19-an de julio

7.00-8.00 (!) matenmanĝo

- - -

8.30 forveturo de la buso

Tuttaga ekskurso al Brno:

- vizito de la Teknika muzeo kun ekspozicio de blindula kulturo

- prelego pri K. Em. Macan kaj pri la 90-a datreveno de la unua kongreso de blindaj esperantistoj en Prago (1921)

- ekspozicio de muzikmaŝinoj kaj gurdoj

- vizito de la Monumento de paco sur batalkampo, kie okazis en la jaro 1805 "batalo de tri imperiestroj"

- vizito de proksima kastelo

- - -

18.30 vespermanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

Merkredo la 20-an de julio

7.00-9.00 matenmanĝo

8.30 lingva kurso de Esperanto - salono Krchňák

10.00 ĝenerala asembleo de LIBE (dua parto) - salono Macan

- - -

12.30 tagmanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

- - -

14.30 forveturo per buso

15.00 vizito de baziliko sur la Sankta monteto

16.30 vizito kaj libera promeno en loka bestĝardeno

19.00 vespermanĝo - restoracio en hotelo SIGMA

20.00 solena fermo de la kongreso - salono Macan

- Internacia arta vespero - salono Macan

Ĵaŭdo la 21-an de julio

7.00-9.00 matenmanĝo

- forveturo de la partoprenantoj

Listo de partoprenantoj

Noto: Antaŭ la nomo de ĉiu akompananto estas steleto.

Aŭstrio (5)

ETZENBERGER Henriette
HAUPT Veronika
* HAUPT Ingeborg
RADER Harald
* RADER Gabriele

Bulgario (4)

DIMITROV Dimitar
STOJANOVA Radka
STOILOVA Veselina
* STOILOV Mladen

Ĉeĥio (9)

JELÍNEK Jiří
JELÍNKOVÁ Milena
KARAŠ Tadeo
* KARAŠOVÁ Ivana
* VEJMELOVÁ Pavla
PŘÍBORSKÝ Jan
* KEBRDLOVÁ Marie
VOKÁČOVÁ Danuše
* DOLEŽALOVÁ Marie

Finnlando (2)

KARVINEN Arvo
* SABELLI Ritva

Germanio (2)

KASYMOVA Natalia
* NEUE Gunter

Hungario (2)

VARRÓ Andrea
VARRÓ Attila

Italio (4)

DA COSTA Pier Luigi
* GALYTSKA Elina
GENTILI Laura
* GIOMMONI Paola

Japanio (6)

KATAOKA Tadashi
* NAKAJIMA Akatsuki
KIKUSIMA Kazuko
TANABE Kunio
TANAKA Tetsuĝi
* TANAKA Miori

Kroatio (7)

BAKSA Franko
* TODORVIĆ Anca
KOVAĆ Antun
* KOVAĆ Marija
STOKOVIĆ Dragan
* STOKOVIĆ Danijela
Infano STOKOVIĆ Marija

Pollando (4)

BARTYŃSKI Andrzej
* BARTYŃSKA Krystyna
KUROPATNICKA-SALAMON Halina
* SAWICKA Elzbieta

Rusio (3)

PENČUKOV Nikolaj
* PENČUKOVA Galina
Infano PENČUKOV Daniil

Entute: 48 personoj

K. Em. Macan kaj 90-jara datreveno de la unua IKBE en Prago 1921

Estas konate, ke nia 77-a kongreso okazas en la jaro de la 90-a datreveno de efektiviĝo de la unua IKBE, okazinta en Prago en la jaro 1921. Tial ni menciuj homon, kies laboro ĝis nun alportas bonon sur pluraj kampoj de vivo de blinduloj.

Estas eble ĝenerale konate, ke K. Em. Macan apartenas al pioniroj de E-movado kaj blindulmovado ne nur en nia lando, sed ankaŭ sur kampo internacia. Li naskiĝis la 25-an de decembro 1858 kaj forpasis la 6-an de februaro 1925. Lia naskiĝurbo estas Pardubice en orienta Bohemio, kie hodiaŭ unu strato havas lian nomon.

Lia unua instruisto estis lia patro, fervoja inĝeniero, kiu rimarkinte la grandan talenton de la knabo dediĉis al li pli da atento ol al siaj ceteraj gefiloj. Jam en la aĝo de kvar jaroj Karlo scipovis legi, skribi kaj kalkuli.

La bazan lernejon li vizitadis en vilaĝo apud Plzeň (Pilzeno), naskourbo de inĝeniero Macan. Tie Karlo komencis lerni violonludadon.

Post kiam la patro ricevis taskon zorgi pri konstruo de fervojlinio proksime de Prago, la familio transloĝiĝis en la ĉefurbon. Tie Karlo vizitadis bazan kaj mezan lernejojn.

La 19-a de oktobro 1870 estis por li fatala. Li ludis kun eksplodaĵo kaj ĝi grave vundis lian okulon. Ĉar oni ne forprenis la difektitan okulon tuj, eĉ la alia okulo malsaniĝis. Kun multaj malfacilaĵoj la junulo finis mezlernejan kaj politeknikan studadojn. Post malsukcesa okuloperacio li tute perdis la vidkapablon. Tiam iĝis lia unusola konsolo la muziko. Li sidadis multajn horojn ĉe la fortepiano.

Li submetiĝis al ekzameno por studi Orgenistan lernejon. Li sukcesis tiel bone, ke li estis akceptita rekte en la duan klason. En la lernejo li apartenis al la plej bonaj lernantoj.

Kiam Karlo alportis al profesoro Skuherský (kiu instruis komponarton) sian meson komponitan en "eklezia modo", tiu diris al li, ke li estas blinda Palestrina.

La dua meso de Macan (en dorika modo) estis prezentita, post kiam J. Brahms rekomendis ĝin, en Votiva preĝejo en Vieno. Poste sekvis pluraj aliaj komponaĵoj por orkestro, arĉkvartetoj, kamermuziko kaj serioj da kantoj.

Sed Macan estis ne nur muzikkomponisto. Li organizis klerigadon de blinduloj, fondis bibliotekon kun brajlaj libroj kaj komencis eldonadi regulajn brajlajn gazetojn.

Lian agadon sur la kampo de E-o mi jam menciis. La pinto de ĉi tiuj streboj estis la unua kongreso de blindaj e-istoj en Prago en la jaro 1921.

Estos certe interese citi el la libro de Joseph Kreitz - "Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj". Temas pri ĉapitro 14.

"Ŝajnas al ni necese pli detale raporti pri la unua IKBE okazinta en Prago, la ĉefurbo de la juna Ĉeĥoslovaka respubliko, de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1921, samtempe kun la 13-a Universala kongreso de Esperanto.

Estis Karel Emanuel Macan, la bonfama ĉeĥa muzikkomponisto kaj blindulpedagogo, unu el la unuaj pioniroj de Esperanto inter nevidantoj, kiu havis la ideon organizi la unuan kongreson blindul-esperantistan kun neimageble bona sukceso. Ĝin partoprenis 58 blinduloj

kun 13 vidantaj gvidantoj, sume do 71 personoj, inter ili laŭalfabete 1 anglino, 3 aŭstroj, 51 ĉeĥoslovakoj, 2 danoj, 3 francoj, 6 germanoj, 1 hispano, 1 hungaro, 1 nederlandanino, 1 svedo kaj 1 sviso.

Per sinceraj vortoj nia estimata kaj kara "paĉjo de nevidantoj" prof. Theophile Cart malfermis la kongreson. En sia parolado li klarigis, ke danĝera okulmalsano de lia infano alkondukis lin al la nevidantoj. Ĝerçe li priskribis la unuajn kuraĝajn paŝojn por disvastigi la Internacian lingvon inter la blinduloj. Ekzemple li intervenis ĉe diverslandaj reĝinoj, el kiuj nur unu sendis vere "reĝinan" donacon de cent kronoj! Alia, la rumana reĝinopoetino Elizabeto Carmen Sylva, promesis unusola efikan helpon, dum aliaj kronumitaj kapoj lasis mian "rekomendite" senditan Esperantan gramatikon porblindulan neatentita. Kiam li rememoris sian amegatan filon, mortintan sur franca batalkampo, la subite elokuliĝintaj larmoj surverŝis lian noblan vizaĝon kaj li pro troa emocio preskaŭ ne kapablis paroli. Same kortuŝa estis la momento, kiam li, parolante pri la meritoj de nia pioniro Macan, kliniĝis al li, ĉirkaŭprenis kaj kisis lin."

En sekvanta parto de la ĉapitro estas priskribita la paso de la unua kongreso. Estis prezentitaj pluraj raportoj pri la stato de blindulmovado en diversaj landoj laŭ deveno de unuopaj partoprenantoj, kaj pri agado de asocioj de nevidantaj esperantistoj.

Pri la situacio en la prizorgado de blinduloj en Ĉeĥoslovakio raportis prof. Stanislav Stejskal, amiko de Macan kaj ĉefa helpanto ĉe la organizado de la kongreso.

Menciinda estas parolado de du partoprenantinoj pri la postuloj de nevidantaj virinoj. Unu el ili estis s-anino Marie Švecová el Ĉeĥoslovakio, kiu emfazis bezonon de instruado pri hejmmastrumaj laboroj inter blindaj knabinoj.

La grava evento en la programo de la kongreso estis publika koncerto, dum kiu prezentis sin i.a. kelkaj konataj blindaj muzikistoj, inter ili tiaj personecoj kiel Ema Polandová, Josef Toman, Alois Perman kaj Oldřich Nepomucký.

La plej grava postulo de la unuanime aprobita rezolucio estis ĝenerala enkonduko de Esperanto en ĉiujn blindullernejojn en la tuta mondo. Plue estis proponitaj la jenaj: kreo de universala blindulorganizaĵo esperantista, starigo de internacia biblioteko porblindula en Leipzig (Germanio), starigo de internacia blindulafera informejo kaj statistikejo.

En la fino de la ĉapitro 14 s-ano Joseph Kreitz konstatas: "Sen troigo oni povas aserti, ke la unua Internacia blindul-esperantista kongreso faris gigantan laboron kaj per tio metis la fundamenton por estontaj kongresoj."

Por aldoni informojn pri kunagado de Macan je kreo kaj disvolviĝo de Esperanto-movado ĉe ni, mi citas ankoraŭ kelkajn frazojn el alia ĉapitro de menciita libro:

"Karel Emanuel Macan iniciatis fondon de la Societo de Ĉeĥoslovakaj blindaj esperantistoj "SOĈNE" la 14-an de septembro 1921. Ĝia unua prezidanto estis Macan kaj sekretario prof. Stanislav Stejskal. La societo estis sukcesa, post mallonga tempo ĝi havis 60 membrojn. Krom lernolibroj kaj vortaroj ĝi eldonis ankaŭ gazeton Aŭroro. Komence Aŭroro havis 4 paĝojn ĉiun duan monaton. SOĈNE ankaŭ administris Internacian Centron de Informoj kaj Statistiko de Blindulaferoj. Societo sukcese laboris ĝis la jaro 1939, kiam post okupacio de Ĉeĥoslovakio Esperanto estis malpermesita."

El pluraj fontoj kompilis J. Jelínek

Pri blindulsekcio en la Teknika muzeo en Brno

La muzeo ekestis surbaze de privata kolekto de D-ro Josef Smýkal, kiu tiuspecajn objektojn komencis kolekti jam en kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento. Al la unuaj aĵoj apartenis tiutempe uzata tabuleto por skribi brajlon kaj helpilo, kiu ebligis "skribi" latinajn literojn pere de pecoj, sur kiuj estis pintoj formantaj unuopajn signojn. La literoj sur papero do konsistis el truetoj kaj la teksto do estis legebla por vidantoj.

La kolektitaĵoj alvenadis de diversaj donacantoj. Multaj blinduloj eksciinte, ke D-ro Smýkal kolektas tiajn objektojn, kontribuis al la kolekto per specialaj metiistaj iloj. Plurajn objektojn donacis la blindullernejo kaj multaj devenas el subtegmenta spaco de porblindula presejo, kien oni fordonis ilin kiel jam ne plu uzeblan fatrason. Kelkaj objektoj trovis vojon en la kolekton post la mondekspozicio de blindulpreso en la jaro 1935. Al ili apartenas ekzemple ŝablono por skribi japanan skribon kaj kliŝoj por legi japanan brajlon.

Dum jaroj la kolekto kreskis kaj okupis multe da loko en la loĝejo. Sed kiam la fervorulo ricevis maŝinon por krei brajlajn kliŝojn, li jam devis lui pluan ejon en la domo.

En la jaro 1977 en porblindula lernejo en Brno estis malfermita ejo, en kiu troviĝis ekspozicio de kelkaj ekzempleroj de la kolekto por ĉiuj interesiĝantoj.

En la jaro 1989 en Brno oni donis je dispono al la fondota muzeo domon, en kiu antaŭe troviĝis metiistaj laborejoj. Post necesa rekonstruo oni solene malfermis la muzeon la 9-an de majo 1992.

En la jaro 2000 la muzeo fariĝis parto de la Teknika muzeo en Brno kiel ĝia "Fako de tiflopediaj informoj".

Nun en la eksponejo vi povas trarigardi librojn presitajn en brajlo kaj en reliefa skribo, maŝinojn por skribi kaj presi brajlon, materialojn por instrui geometrion, matematikon, geografion kaj muzikedukajn rimedojn, sed ankaŭ historiajn aparatojn por aŭskulti parolitajn librojn ktp. ktp.

La vizitantoj povas trarigardi ankaŭ diversajn ilojn por ĉiutaga bezono kaj ludilojn. Oni povas konatiĝi kun kompletaj brosfarista kaj korbifarista laborejoj kaj vidi ilaron de blindaj pianagordistoj.

Pri la blindulmuzeo oni daŭre informas la publikon en amaskomunikiloj. Fakuloj, kiuj laboras en la muzeo, publikigis multajn fakajn artikolojn pri la vivo kaj laboro de blinduloj en pasinteco kaj nuntempe.

Ĉiuj interesiĝantoj estas kore invitataj por konatiĝi kun ĉi tiuj unikaj objektoj.

Laŭ artikolo de Mgr. E. Hluší prilaboris J. Jelínek

Esperanto-ĉeĥa vortareto

Enkondukaj rimarkoj

Ĉeĥajn literojn kun supersignoj oni devas prononci jene:

ž = ĵ

š = ŝ

č = ĉ

ř = rĵ (prononcu rapide, ĉar fakte tio estas unu sono)

Silabojn "dĕ, tĕ, nĕ" prononcu mole kaj rapide: "dje, tje, nje".

Silabojn "bĕ, pĕ, vĕ" prononcu "bje, pje, vje".

Silabon "mĕ" prononcu "mnje"

Vokaloj á é í ó ú ŭ ý estas longaj.

Literojn "ch" legu "ĥ".

Vokalon "y" prononcu "i".

Silabojn "di, ti, ni" en la ĉeĥa prononcu mole kaj rapide: "dji, tji, nji".

Silabojn "dy, ty, ny" en la ĉeĥa prononcu kiel "di, ti, ni" en Esperanto.

Salutoj:

Bonan matenon! - Dobré ráno!

Bonan tagon! - Dobrý den!

Bonan vesperon! - Dobrý večer!

Bonan nokton! - Dobrou noc!

Ĝis la revido! - Nashledanou!

Ĝis la! - Nashle!

Saluton! (nur inter konatoj) - Ahoj!, Nazdar!

Avertoj:

atentu! - pozor!

haltu - stůj, stůjte, stát

atendu - počkej, počkejte

ŝtupo - schod

ŝtuparo - schody

atentu la ŝtupon - pozor schod

atentu la ŝtuparon - pozor schody

Numeroj:

unu - jeden, jedna, jedno

du - dva, dvě

tri - tři

kvar - čtyři

kvin - pět

ses - šest

sep - sedm

ok - osm

naŭ - devět

dek - deset

dek unu - jedenáct

dek du - dvanáct

dek tri - třináct

dek kvar - čtrnáct
dek kvin - patnáct
dek ses - šestnáct
dek sep - sedmnáct
dek ok - osmnáct
dek naŭ - devatenáct
dudek - dvacet
dudek unu - dvacet jedna
dudek du - dvacet dva
dudek tri - dvacet tři
tridek - třicet
kvardek - čtyřicet
kvindek - padesát
sesdek - šedesát
sepdek - sedmdesát
okdek - osmdesát
naŭdek - devadesát
cent - sto
ducent - dvě stě
tricent - třista
kvarcent - čtyřista
kvincent - pětset
mil - tisíc
dumil - dva tisíce
trimil - tři tisíce
duoble - dvakrát
trioble - třikrát

Mono:

mono - peníze
krono - koruna
du kronoj - dvě koruny
kvin kronoj - pět korun
cent kronoj - sto korun
unu eŭro - jedno euro

Peto, danko, diversajtoj:

jes - ano
ne - ne
mi - já
vi - ty
li - on
ŝi - ona
mi petas - prosím
dankon - děkuji
nedankinde - není zač
mi bezonas - potřebuji
mi devas - musím
mi volas - chci
mi ne volas - nechci
ĉu vi volas? - chceš?, chcete?

mi havas - mám
mi ne havas - nemám
estas - je
tio - to
kio - co
kie - kde
tie - tam
tie ĉi - tady
supre(n) - nahoře, nahoru
malsupre(n) - dole, dolů
dekstre(n) - vpravo, doprava
maldekstre(n) - vlevo, doleva
rekte - rovně, přímo

Manĝaĵoj, trinkaĵoj:

salo - sůl
sukero - cukr
pano - chleba
bulko - houska, rohlík
terpomoj - brambory
bulo - knedlík
rizo - rýže
butero - máslo
fromaĝo - sýr
mielo - med
jogurto - jogurt
ovo - vejce
ŝinko - šunka
kolbasetoj - párky
viando - maso
bovaĵo - hovězí
porkaĵo - vepřové
kokidaĵo - kuřecí
supo - polévka
legomo - zelenina
salato - salát
laktuko - salát
karoto - mrkev
brasiko - zelí
akvo - voda
iom da akvo - trochu vody
minerala akvo - minerálka
suko - džus
kafo - káva
lakto - mléko
kremo - smetana
teo - čaj
biero - pivo
vino - víno
blanka - bílé
ruĝa - červené
manĝi - jíst

trinki - pít
manĝaĵo - jídlo
trinkaĵo - nápoj, pití

En restoracio aŭ magazeno:

ĉu estas libera loko? - je tu volno?
manĝokarto - jídelní lístek
donu al mi - dejte mi
kiom ĝi kostas? - kolik to stojí?
kiom mi pagu - kolik platím
kaso - pokladna
malfermite - otevřeno
fermite - zavřeno
necesejo - toaleta

Vojaĝado:

bileto - jízdenka
sidloko - místenka
pasporto - pas
taksio - taxi
aŭtomobilo - auto
trajno - vlak
vagono - vagón
tramo - tramvaj
buso - autobus
aviadilo - letadlo
forveturo - odjezd
forflugo - odlet

La Espero

(esperantista himno)

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion,
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos!